



# LA PUTO DE GIANNI

UECI Unione Esperantista Cattolica Italiana



Du niaj amikoj esperantistoj el Milano jam de multaj jaroj kolektas monon por ke oni fosu putojn en Etiopio.

Post la morto de Gianni Conti, ili decidis fosigi puton titolitan al li en mizera vilaĝo de regiono Wolayta, kiu estas unu el tiuj pli malriĉaj kaj pli loĝataj en Etiopio.


Spagna
Lisbona
Grecia
Turchia
Siria
Libano
Iraq
Israele
Mar Mediterraneo
Tunisia
Marocco
Algeria
Libia
Il Cairo
Egitto
Arabia Saudita
Golfo Persico
Mar Rosso
Yemen
Golfo di Aden
Sahara Occidentale
Mauritania
Mali
Niger
Ciad
Sudan
Eritrea
Etiopia
Visualizzati di recente
Senegal
Gambia
Guinea-Bissau
Guinea
Sierra Leone
Burkina Faso
Costa d'Avorio
Ghana
Togo
Benin
Nigeria
Lagos
Abidjan
Accra
Golfo di Guinea
Camerun
Repubblica Centrafricana
Sudan del Sud
Somalia
Guinea Equatoriale
Gabon
Congo
Repubblica Democratica del Congo
Nairobi
Tanzania
Dar es Salaam
Malawi
Angola
Mozambico
Madagascar
Namibia
Sudafrica
Città del Capo
Oceano Atlantico Meridionale
Soddo


La vilaĝo nomiĝas WARGO GHENNET kaj ĝi distancas 40 kilometrojn el urbo Soddo.






La puto estas 25 metrojn profunda kaj ĝi utilas por preskaŭ 2000 homoj
(preskaŭ 400 familioj kun averaĝe po 5 filoj).
Sur la puto nomata Gianni estis pentrita Verda stelo, simbolo de Esperanto.

Abba Marcello, misiisto en Etiopio ekde multaj jaroj, inaŭguris la puton kaj sendis al ni la fotojn. Por atingi la vilaĝon li piediris dum kvardek minutoj tra la koto kaj lignaj pontoj ne traveturreblaj per aŭtomobiloj.







# LA FESTO










La homoj akceptis lin kun granda entuziasmo kaj ankaŭ kun multe da dankemo. La vilaĝanoj estis tre feliĉaj pri tiu servo, kiu estas vere grava por ili, ĉar ĝis nun ili estis devigitaj ĉerpi el la rivero la akvon, kiu estas malklara kaj flava.

# La autoritatoj



Abba Marcello en Soddo konstruis la "Vilaĝon de la ridetantaj infanoj", en kiu stratinfanoj havas la eblecon dormi, manĝi kaj vivi en akceptema medio kaj ricevi edukon.
En tiu urbo, miloj da infanoj vivas surstrate, almetataj al malpuraĵoj, ĉikanado, al la perfortaĵoj de la plenkreskuloj kaj de la potenculoj de la kvartaloj.

https://villaggiodeiragazzisorridenti.org

# Gianni kaj Mariolina
# edziniĝis la 22-an de aprilo 1957



**MARIOLINA BERTORELLE**

La 8-an de aprilo 2020, post longa kaj dolora malsano, forpasis Mariolina Bertorelle. Ni memorigas ŝian sindevigon en UECI kaj CEM en Milano. Ĉiam ĉeestanta dum la esperantaj-mesoj kaj ĉe diversaj kongresoj. Ridetanta, bonhumora kaj tre gastigema kun ĉiuj amikoj kaj esperantistoj, kiuj volis viziti la faman ĝardenon de sia bela hejmo en Cormano. Por multaj el ni, ŝi estis ekzemplo de sento de devo, alligiteco al la familio kaj praktiko de evangeliaj valoroj.

**GIANNI CONTI**

Gianni Conti forpasis la 1-an de Aŭgusto 2022. Dum multaj monatoj enhospitaligita, li esperis ĝis la lasta momento rekomenci paŝi por labori en sia fama ĝardeno. Ni memoras lin kiel kreivan kaj nelacigeblan homon. Per sia entuziasmo li instruis al ni ĉiuj ne malŝpari eĉ unu momenton de la vivo por strebi al niaj idealoj. Konsolas nin scii, ke li nun estas reunuigita kun la amata Mariolina. (Katolika Sento)

Unione
Esperantista
Cattolica
Italiana

DANK' AL IDA, GABRIELE, CARLO, EROS, FRANCESCO kaj TIZIANA.